La *korelativa danco* – klarigo por la filmoj

Kapabli bone uzi la korelativojn – tielnomatajn tabelvortojn - estas unu el la bazaj lertoj por ĉiu Esperantisto. Bedaŭrinde, malgraŭ ilia laŭlogika ordigo, multaj lernantoj spertas malfacilaĵojn sufiĉe rapide rememori la bezonatan korelativon. Se la kono ne enradikiĝis en aŭtomatismo, la rekonstruo de la tabelo postulas de la cerbo tro da tempo.

Mi proponas fizikan aktivecon por ligi la korelativojn al gestoj, tiel ke naskiĝu refleksoj por ĉiu koncepto. En mia '*korelativa danco*' ĉiu korelativo konsistas el du gestoj, unu por la unua parto (ki-, i-, ti-, ĉi-, neni-) kaj unu por la dua parto (-o, -u, -a, -e, -en, -am, -om, -es, -al).
La prezento de la gestoj estas videblaj sur la unua filmeto.

Kiel enkonduki la dancon?

I-a parto
La instruisto povas - kiel mi - unue prezenti la du apartajn seriojn, kaj poste demonstri kelkajn kunmetaĵojn.
Sekve, la instruisto daŭrigas la prezenton, sed estas la publiko, kiu nomas la montritajn korelativojn.
Poste estas la vico de la instruisto diri kaj la lernantoj montru la vortojn.

II-a parto
En duopoj montri/nomi korelativojn estas bona maniero ekzerci la novan 'dancon' kaj oni povas fini la sesion (kiu entute daŭras malpli ol 15 minutojn) per la du jenaj aktivaĵoj:

- La instruisto dismetas sur la plankon kartojn. Sur ĉiu karto estas unu korelativo. Ili estas lokitaj kun pli-malpli unu metro da distanco inter si. La partoprenantoj paŝas de karto al karto farante por si mem la taŭgan kunmetitan geston, samtempe laŭtvoĉe eldirante la vorton.
- La instruisto silente prezentas 'korelativan poemon' kiun la publiko samtempe eldiras. Ekzemplo: Neniu... Neniam... Iu... Kiam? Kie? ... Tiu! Tie! Ĉiam! ...Tien!!! (serĉo kaj trovo de amo ☺)

En sekva renkontiĝo, la instruisto povas ripetigi la konojn per rakontado kun multaj korelativoj, kiujn li nur per gestoj montras (kaj tiam la publiko eldiras ilin) aŭ kiun li jes ja eldiras, kaj tiam la publiko akompanas lin per gestoj.

Kun iom da ekzercado nestas la reflekso en la korpo kaj oni ne plu bezonas pripensi. La korpo liveras tuj la bezonatajn vortojn.

Pri tio kiel eblas elŝuti la po 50 MB filmojn vi trovas klarigon sur la sekva paĝo.

El la LERNILOTEKO de edukado.net Aŭtoro: Sylvain Lelarge

Korelativa danco en la reto

Prezentata de Sylvain Lelarge kaj la kursanoj de la Artoŝoko-kurso,
okazigita en Loveno-la-Nova, Belgio, en decembro 2006. – La filmon pretigis: Joëlle Corroy

La du filmeroj troveblas en germana hejmpaĝo, la elŝuto estas senpaga, sed oni devas sekvi la anglalingvajn instrukciojn por kio ni ĉi-sube donas helpon.
Jen la du ligiloj:

http://rapidshare.com/files/10911931/esperanto_korelativtabelo.mpg (50 mb)

http://rapidshare.com/files/10912712/esperanto_korelativtabelo_ekzerco.mpg (50 mb)

- en la suba parto de la paĝo alklaku sur FREE,
- venas nova paĝo
- tie meze vi vidas kalkulilon. Atendu ke ĝi iru ĝis 0.0 (1 minuto)
- en la venonta paĝo ĉ. meze vi vidas amason da literoj kaj ene de tiu bildo kvar nigrajn literojn dise lokitajn. Provu deĉifri ilin kaj kopii en la kadreton post la vorto: here: ..... Kaj poste puŝu la butonon Download from.... Kaj savu, elŝutu la filmon.

Ili estas ĉ. 50 MB grandaj, la elŝuto povas daŭri kelkajn minutojn.

Bonvolu skribi vian opinion pri la ekzerco al redaktanto@edukado.net .
Je eventualaj demandoj Sylvain volonte respondos.
Ni pretigis pli detalan filmon, sed ĝia grandeco kaj niaj teĥnikaj ebloj ankoraŭ ne maturas krei facile elŝuteblan version.